# TEJO-aktuale: numero 175, 2005-11-22

---

T E J O - A K T U A L E          N-ro 175 (22 novembro 2005)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>

---

1. MALFERMA TAGO EN LA CO ĈI-SABATE
2. DISKUTU ĈE LINGVA PRISMO -- ENMIGRINTOJ KAJ LOKA LINGVO
3. KONTRIBUU AL KONTAKTO -- PRI MITOJ
4. RENKONTIĜO PRI KELTAJ LINGVOJ VENONTJARE GERMANIE
5. ALIĜU AL TEJO -- PLEJ SIMPLE NUN!

---

1. MALFERMA TAGO EN LA CO ĈI-SABATE

Sabaton 2006-11-26 estos en la Centra Oficejo, kiel jam
por la lasta novembra sabato tradicias, Malferma Tago.
La 50-an datrevenon de transloĝiĝo de la Centra Oficejo
al Roterdamo oni omaĝos  per historia prelego de
Ziko SIKOSEK, kiu intervjuos ankaŭ iamajn oficistojn
John RAPLEY kaj Victor SADLER. La partoprenantoj
povos ankaŭ ĝui la ludan antaŭ-, dum- kaj post-tagmezon,
kiun organizos Nederlanda Esperanto-Junularo.
Al la malferma tago neforpenseble apartenas
senpagaj loterio, kafo kaj tejo.
Vi povas legi la koncernan Gazetaran Komunikon de UEA ĉe
http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/gaz216.html#3
kaj se vi ne scias, kiel la CO-n atingi, bonvolu legi ĉe
http://co.uea.org/~tejo/kiel_atingi.html

---

2. DISKUTU ĈE LINGVA PRISMO --- ENMIGRINTOJ KAJ LOKA LINGVO

Unu el la plej grandaj problemoj kiujn enmigrintoj alfrontas,
estas lerni la lokan lingvon. Ofte ili vivas en sialingvaj
komunumoj, do povas aperi nenecese aŭ eĉ neeble lerni
la oficialan lingvon de la lando en kiun ili enmigris.
Ĉu ŝtataj institucioj devas kuraĝigi enmigrintojn
lerni la lokan lingvon, ekzemple per lingvokursoj?
Ĉu traduki indikilojn kaj publikajn dokumentojn
en la lingvon de la minoritato? Ĉu simila problemo
ekzistas en via lando? Ekdiskutu ĉe
http://www.lingvo.info/forumo/?lingvo=eo

---

3. KONTRIBUU AL KONTAKTO -- PRI MITOJ

La revuo "Kontakto" daŭre serĉas kontribuojn! Ĝis la redaktofino
de la sekvonta numero (2006:1) ankoraŭ restas komforte sufiĉe
da tempo, sed kial ne rememorigi pri ĝia temo: KIE MITOJ KAJ
REALECO INTERPLEKTIĜAS. Ĉu en via lando loĝis homo, kiu
(aŭ kies prototipo) eniris kaj historion kaj estas heroo de pluraj
fabeloj kaj popolrakontoj? Rakontu pri li/ŝi al la mondo!
Aŭ vi povas pensi pri la temo de la postsekva numero (2006:2),

kiu estas LINGVOJ. Viaj kontribuoj estas ĉiam bonvenataj
kaj ege bezonataj!
Kontaktu la redakcion pri ajnaj demandoj/proponoj:
kontakto(ĉe)tejo.org
Aŭ poŝte: Kontakto, 16800 Phillips Rd., Alpharetta, GA 30004 Usono.

---

4. RENKONTIĜO PRI KELTAJ LINGVOJ VENONTJARE GERMANIE

Inter (ĵaŭ) 2006-08-03 kaj (ĵaŭ) 2006-08-10 en la urbo Kronach
en norda Bavario, Germanio, oni festos la 200-an naskiĝdatrevenon
de Johann Kaspar ZEUSS, kiu aŭtoris la bazan verkon de keltistiko,
Grammatica Celtica (1855). La aranĝo ne estos pure esperantista,
tamen la loka E-grupo kunlaboras ĉe ĝi kaj kore invitas ĉiujn
interesiĝantojn pri la keltaj lingvoj (irlanda, kimra, bretona,
skotgaela, ...). La aranĝo estos ankaŭ subvenciata per EU-rimedoj.
Promesiĝas bona internacia partopreno el Irlando, Francio, Hungario
kaj Turkio. Interesiĝantoj bonvolu peti pli detalajn informojn
ĉe la adreso ae.groetzner(ĉe)t-online.de (Armin Groetzner,
prezidanto de Bavara Esperanto-Ligo)

---

5. ALIĜU AL TEJO -- PLEJ SIMPLE NUN!

Kiam oni membras en multaj asocioj, oni facile perdas trarigardon.
Se vi ne ĝustatempe renovigos sian membrecon aŭ abonon, iuj asocioj
sendas al vi ankoraŭ unu numeron en la venonta jaro, kelkaj sendas
du, kelkaj sendas kaj re-admonas al vi ĝis aŭtuno, kelkaj sendos
al vi tute nenion. Al kiu el ili apartenas TEJO? Mi ne diros al vi,
anstataŭe mi regalos vin per la konsilo, ke renovigi vian membrecon
aŭ TEJO-Patronecon aŭ abonon antaŭ la fino de la jaro plej bone
sekurigos glatan kaj daŭran ricevadon de viaj revuoj, kaj ŝparos
al vi la zorgojn en la venonta jaro, dum kiu vi ĉiukaze ial ekvolos
membri aŭ patroni en TEJO!
La paperaj aliĝiloj por la jaro 2006 estas jam pretaj, kaj ni povas
ilin sendi laŭpete al via loka klubo. Eĉ pli bone estas aliĝi rete
http://www.uea.org/alighoj/
Ĉu vi ne membris nek abonis por la jaro 2005? Vi povas ankoraŭ
aliĝi, ricevonte ĉiujn numerojn kiuj ĉi-jare aperis kaj aperos!

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikajhoj/aktuale/koncepto.html>.
La arkivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>.
La aliĝo: <http://www.abonu.com/catalog/info.tejo>
Informojn kaj komentojn sendu al <aktuale-red@tejo.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Jevgenij GAUS kaj Marteno MINIĤ.
Tiun ĉi numeron redaktis Marteno MINIĤ.

-*-----------------------------------------------------------------------
Malabonu: //abonu.com/member/unsub?grp=info.tejo&email;=oficejo@tejo.org" class="hft-urls">http://abonu.com/member/unsub?grp=info.tejo&email;=oficejo@tejo.org
Elektu alian kodigon: //abonu.com/member/format?email=oficejo@tejo.org" class="hft-urls">http://abonu.com/member/format?email=oficejo@tejo.org

http://abonu.com/ mailto:demandu@abonu.com